

Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda

<http://www.satesperanto.org>

Septembro-Oktobro 2013, n-ro 09-10 (1299-1300)



Sennaciulo

Naciismo kaj riskoj pri reapero de faŝismo

Neniu registaro kontraŭbatalas faŝismon por ĝin detru.
Kiam la burĝaro ekvidas, ke povu elglitas el ĝiaj manoj, ĝi
starigas faŝismon por pluteni siajn privilegiojn.

Buenaventura Durruti



Esperi daŭran pacon inter nacioj estas same
malsaĝe, kiel celi bonfarton per glutado de
veneno: la nacieco ja venenas la homaron.

Eŭgeno Lanti

SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

Redaktangulo

Karaj legantoj,

Duan fojon ni havas la okazon sciigi al vi ke ĉi numeron akompanas la Adresaro! Jen estas tio ĉi la agrabla flanko de malglataĵo okazinta en nia laboro. Efektive, la Adresaro devintus aperi kune kun la antaŭa numero kiel suplemento, sed la plano last-minute ne povis realiĝi pro momenta nedisponeblo de la enpaĝiganto. Sed la enpaĝigantoj Ĝilo kaj Andreo estu dankataj kaj laŭdataj pro ilia bonega laboro: ili kune dediĉis multegan tempon al grandega tasko, kiu ebligas nun al vi teni inter viaj manoj finfine Adresaron freŝdatan!

Kiel suplemento venas ankaŭ kun ĉi numero aliĝilo por la SAT-Kongreso 2014 en Dinano (FR). Ni nur povas rekomendi al vi unue plenigi la aliĝilon kaj sendi al la OKK, due tuj rezervi viajn tempon kaj vojaĝ-biletojn por certigi vian partoprenon. Ni ja pensu, ke eble morgaŭ oni estus morta, kaj tamen estus bedaŭrinde lastan fojon ne esti vizitinta la Kongreson de nia asocio!

En la regula parto de nia revuo, vi trovos ampleksan temdosieron pri "Naciismo kaj riskoj pri reapero de faŝismo". Ĝi estas aparte interesa rilate la situacion, kiun konis SAT antaŭ nelonge, kiam membroj ekŝiĝis pro suspekto je naciismo. Okazo al ni rekonsideri la ĉiasociajn eventojn sub lumo de tutmondaj okazaĵoj.

Ni estas aparte fieraj prezenti la unuan aperon de nova rubriko Teatro, kiun vi ĉiun numeron retrovos, danke al Flora Markov kaj Marcelo Redulez. Tiu ĉi rubriko havas al ni apartan signifon, pro du ĉefaj kialoj. Unue ĝi pliampleksigas la artan temaron, lastatempe



traktita ĉefe el literatura aŭ muzika vidpunkto. Due la prizorgantoj ne estas membroj de la redaktoskipo: por kontribui, necesas ne enmergiĝi en laboregon, sed nur emi alporti sian propran ŝtonon al la konstruado de nia prirevata socio.

Samkiale estas salutinda la apero de "LEA-ana elan", rubriko pri la vivo de la diversaj LEA-oj. Eĉ se ĉi-foje la prizorganto estas eksa skipano plu laboreganta diverskampe en SAT, ĝi respondas al grava bezono pri pli densa komunikado inter la diversaj LEA-oj kaj neformalaj laborgrupoj, kiuj aktivas por la diskonigo de SAT kaj de Esperanto en laborista medio.

Fine, kiel kutime, vi trovos ankaŭ divers-temajn artikolojn, kiuj kompletigas ĉi buntan numeron. Ni deziras ke vi havu egan plezuron per legado de tiu ĉi *Sennaciulo*.

La RK (Redaktoskipa Kunordigotrio)

REMORIGO – limdatoj por venontaj dosiertemoj:

- Usona imperio. Kunordiganto *Kani* - 12-a de Januaro 2014
- Latinameriko. Kunordiganto *Brandon Sowers* - 12-a de Marto 2014
- Kongresa Temo: Civitanoj loke konstruas ontecon. Kunordiganto *Guy Martin* - 12-a de Majo 2014
- Konspiroj kaj konspiriteorioj. Kunordiganto *Djemil Kessous* - 12-a de Julio 2014
- Pliaj proponoj bonvenaj por la postaj numeroj.

Enhavo

Redaktangulo	2
Naciismo kaj riskoj pri reapero de faŝismo	4
Enkonduko	4
Eŭropa kontraŭfaŝisma manifesto	4
Kial mi taksas grava la Manifeston?	7
Kelkaj notoj pri la kontraŭfaŝismo	8
Naciaj kaj etnaj minoritatoj en Pollando	9
La dek-unuan de Septembro	13
Faŝismomurdas. Kune ni alfrontu ĝin!	13
Faŝismo kaj naciismo en "demokrata" Hispanio	13
Kontraŭnaciisma klerigo: novaj agadmanieroj	17
20-jariĝo de la reunuiĝo?	18
Kvinoble por la nacio = kvinoble malĝuste	19
Politiko	22
Kiuj estas la veraj novkuloj?	22
Ekonomiaj kaj socialaj modeloj	25
El la teler-kesto	27
Ĉu manĝa etiko estas tabuaĵo?	27
Intelekta memdefendo	29
SAT-anoj aktivas	30
LEA-ana elan' - n°1	30
Interkonsento inter Paca Solidareco de Esperanto (PSE) kaj Libera Esperanto-Asocio en Hokajdo (LEAH)	31
Nekrologo	32
Tra Esperantio	32
SAT-Kongreso 2014 en Dinano	33
El la SAT-administrejo	34
Kotizo	34
Rubriko Teatro	35

Praktikaj informoj

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97

Retadreso: satesperanto@free.fr

Retejo: <http://satesperanto.org>

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris

IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

Plenum-Komitato de SAT

Prezidanto: Vinko Markovo

Sekretario: Tereza Sabatier

Kasistino: Franjo Lévêque

Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

Sennaciulo

Ĉefredaktantoj: Andreo Hoaro, Robin' Beto, Vinko Markovo

Enpaĝiganto: Ŝtonĉjo

Ceteraj redaktantoj: Nikolao Gudskov, Jomo

Ipfelkofer, Djémil Kessous, Petro Levi,

Grazina Opulskiene, José Maria Salguero

(Kani), Franciska Toubale

Kontribuojn sendu elektronike al:

sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: leveque.franjo@gmail.com

Libromendojn sendu al:

libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al:

pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendadas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.

Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567

